*Enira antifono*

**Lumo konstanta brilos por viaj martiroj, Sinjoro;
ili vivos eterne, haleluja.**

*Ofera preĝo*

**Akceptu, Sinjoro, la oferdonon de reakordiĝo kaj laŭdo,
kiun ni venas prezenti al Vi
en la memoro de beata Tito, Via martiro:
ni ricevu danke al ĝi pardonon de niaj kulpoj
kaj ĝi starigu nin en daŭra dankopreĝo.
Per Kristo nia Sinjoro.**

*Prefacio de la sanktaj Martiroj*

*Komunia antifono (laŭ Joh 12, 24)*

**"Vere, diras la Sinjoro, se la tritika grenero
ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi restas sola;
sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto." Haleluja.**

*Postkomunia preĝo*

**Postkiam ni manĝis el tiu unika pano,
en la memoro de beata Tito,
ni petegas Vin, Sinjoro:
firmigu nin senĉese en via amo
kaj igu nin vivi per nova vivo.**

Beata Tito Brandsma - memoro - 27a de julio

*Prefacio (sanktaj Martiroj)*

C: **La Sinjoro estu kun vi.**
K: **Kaj kun via spirito.**

C: **Leviĝu viaj koroj.**
K: **Ni havas ilin ĉe la Sinjoro.**

C: **Ni danku al la Sinjoro, nia Dio.**
K: **Estas inde kaj juste.**

C: **Vere estas inde kaj juste, ĝuste kaj save,
ke ni ĉiam kaj ĉie danku al Vi, Sinjoro, Patro sankta,
ĉiopova eterna Dio:**

**Ĉar la sango de beata martiro Tito,
elverŝita pro konfeso de Via nomo
imite al Kristo,
manifestas Viajn mirindaĵojn.
Tiel, Vi disvolvas potencon en febleco
kaj fortikigas malfortulojn por atesti pri Vi,
per Kristo, nia Sinjoro.**

**Pro tio kune kun la anĝeloj kaj ĉiuj sanktuloj ni gloras Vin,
senĉese dirante:**

CK: **Sankta, sankta, sankta estas la Sinjoro, Dio de legiaroj.
Plenas de Via gloro la ĉielo kaj la tero.
Hosana en la altoj!
Benata, kiu venas en la nomo de la Sinjoro.
Hosana en la altoj!**